

2025.1.10

Kara Hori,

Mi plu sendas al vi la salutmesaĝon por la asocio Nihon Hidankyo, skribita de Colette kaj André Weiss.

Mi gxin tradukis france kaj gxin legos okaze de la manifestacio de la 26a de januaro en Bretonio.

Cxu ankaux vi povus traduki japane por ke mi povus surpaperigi kaj transdoni la mesagxon al S-ro Shigemitsu Tanaka kaj aliaj reprezentantoj de Nihon Hidankyo.

Mi antaux dankas vin.

Tutkore,

Claudine. ☺

2025. 1. 10 堀様

コレットとアンドレ・ワイスが書いた日本被団協への挨拶文もお送りします。私はそれをフランス語に翻訳し、1月26日にブルターニュで行われるデモで読み上げる予定です。メッセージを書き留めて日本被団協の他の代表者に届けることができるように、日本語に翻訳していただけますか。 よろしくお願ひします。 心から、 クロディーヌ。 ☺

Traduko de la letero sendita al la Prezidento de la franca Respubliko

Sinjoro Prezidento de la Respubliko Palais de l'Élysée 55,
rue du Faubourg-Saint-Honoré 75008 Paris

Temo : Traktato pri la malpermeso de nukleaj armiloj

Sinjoro Prezidento de la Respubliko,

La 20-an de septembro 2017, UNo proponis al ĉiuj landoj la « Traktaton pri la malpermeso de nukleaj armiloj » por ke ili subskribu ĝin. En septembro 2017 ni skribis al vi por peti ke Francio subskribu tiun Traktaton. Post unu jaro, vi ne subskribis ĝin kaj vi ne respondis al ni.

Ni rememorigas al vi la argumentojn favore al tiu subskribo. **La atomarmilaro ankaŭ nomita « deadmona armilaro » estas senefika** kontraŭ la atencoj sur nia teritorio.

La atomarmilaro ankaŭ nomita « deadmona armilaro » estas danĝera, ĝia uzo por defendi la interesojn de Francio en la mondo estas nepensebla, ĉar tio estigus mondan katastrofon.

La atomarmilaro ankaŭ nomita « deadmona armilaro » estas kosta : pli ol 4 miliardoj en la jara buĝeto de nia lando, 420 miliardoj ekde la lanĉado.

Kontraŭ via silento, la **referendumo estas necesa por preni decidon**.

Bonvolu akcepti, Sinjoro Prezidento de la Respubliko, niajn respektajn pacistajn salutojn.

La 20-a de septembro 2018

Colette Weiss

André Weiss

フランス共和国大統領宛ての書簡

共和国大統領閣下 エリゼ宮

55, Faubourg-Saint-Honoré 通り 75008 パリ

テーマ：核兵器禁止条約

共和国大統領閣下、

2017 年 9 月 20 日、国連は「核兵器禁止条約」をすべての国に署名するよう提案しました。2017 年 9 月に、私たちはフランスがこの条約に署名するよう要請する手紙をあなたに送りました。1 年経っても、あなたは署名もせず、私たちに返答もしていません。

この署名を支持する議論を思い出してください。

「破壊兵器」とも呼ばれる核兵器は、我が国の領土への攻撃に対しては効果がありません。

「破壊兵器」とも呼ばれる核兵器は危険であり、世界におけるフランスの利益を守るために核兵器を使用することは、世界的な大惨事を引き起こすことになるため、考えられないことです。

「殺傷兵器」とも呼ばれる核兵器は高価であり、我が国の年間予算は 40 億ユーロ以上、発射されれば 4200 億ユーロに上ります。

あなたの沈黙に対しては、**決定を下すために国民投票が必要になります。**

共和国大統領閣下、私たちの敬意を込めた平和主義的な挨拶をお受けください。

2018 年 9 月 20 日

コレット・ワイス

アンドレ・ワイス

(エスペラントに翻訳された核兵器禁止条約)

* 日本語の翻訳を読みたい方は、[\(3\) 資料② 核兵器禁止条約日本語訳全文.pdf](#)

Traktato pri la malpermeso de nukleaj armiloj

Traktato tradukita el oficiala franca teksto (フランス語の公式の訳からの翻訳)

Colette Weiss kaj André Weiss

grupo « Per-Esperanto-por-Paco

septembro 2017

Projekto de Traktato pri la malpermeso de nukleaj armiloj

La Ŝtatoj ratifintaj tiun Traktaton,

rezolutaj kontribui al la realigado de celoj kaj principoj vortigitaj en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj,

tre maltrankvilaj pro humanaj katastrofaj konsekvencoj de eventuala uzo de nukleaj armiloj, opinias ke necesas tute elimini tiujn armilojn, ununura rimedo por asekuri ke la nukleaj armiloj neniam plu estu uzotaj, kiaj ajn estos la cirkonstancoj,

konsciaj pri la riskoj de persistado de nukleaj armiloj, interalie pro la risko de eksplodoj de nukleaj armiloj estigotaj pro akcidento, aŭ pro eraro de interpreto aŭ intenco ago, kaj substrekante ke la riskoj koncernas la sekurecon de la tuta homaro kaj ke ĉiuj Ŝtatoj kune responsas por antaŭveni la uzon de nukleaj armiloj,

konsciaj ke oni ne povas rezisti al la katastrofaj damaĝoj de nukleaj armiloj, kiuj transpasas la naciajn landlimojn, estigas gravajn sekvojn pri la supervivo de la homaro, la medio, la ekonomia kaj socia disvolvado, la monda ekonomio, la nutra sekureco kaj la sano de aktualaj kaj venontaj generacioj kaj tre trafas la virinojn pro la jonigaj radiadoj,

notante etikajn imperativojn por la nuklea malarmado kaj la urĝa neceseco starigi mondon sen nukleaj armiloj, kiu estus grandvalora publika monda bonaĵo, kaj utilis por la nacia kaj kolektiva sekureco,

konsciaj pri suferoj kaj neakcepteblaj damaĝoj spertitaj de la viktimoj pro la uzo de nukleaj armiloj aŭ de provoj de nukleaj armiloj,

konstatante la misproportciajn damaĝojn pro la nukleaj armiloj inter la aŭtoktonaj popoloj,

reasertante ke ĉiuj Ŝtatoj devu ĉiutempe konformiĝi al la internacia rajto interalie al la Humana Internacia Rajto kaj la Homaj Rajtoj,

baziĝante sur la principoj kaj la reguloj de la Humana Internacia Rajto, interalie sur : - la principo, kiu malpermesas al la militantoj uzi senlimajn militrimedojn,

- la principo de distingo,

- la principo pri la malpermeso de atakoj sen discriminacio,

- la principo pri la reguloj rilataj al la proporcieco kaj al la antaŭzorgadoj dum atako, -

la principo pri la malpermeso de la uzo de armiloj, kiuj kaŭzus nenecesajn dolorojn aŭ neutilajn suferojn,

- la principo pri reguloj rilataj al la mediprotektado,

konsiderante ke la uzo de nukleaj armiloj estus kontraŭa al la reguloj de la internacia rajto, aplikeblaj dum la militoj, interalie al la principoj kaj reguloj de Humana Internacia Rajto

reasertante ke la uzo de nukleaj armiloj ankaŭ estus neakceptebla rilate la principojn de la homaro kaj la postuladojn de la publika konscienco,

rememorigante al la Ŝtatoj ke, konforme al la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, ili devu malpermesi al si, dum la internaciaj rilatoj, minaci aŭ uzi la forton, ĉu kontraŭ la teritoria integreco aŭ la politika sendependeco de alia Ŝtato, ĉu per alia nekonforma maniero laŭ la celoj de Unuiĝintaj Nacioj, kaj ke necesas faciligi la pacon kaj la internacian sekurecon deturnante al la armado nur la minimumon de mondaj homaj ekonomiaj rimedoj,

rememorigante ankaŭ al la Ŝtatoj la unuan rezolucion de la ĝenerala Asembleo de

Unuiĝintaj Nacioj aprobitan la 24-an de januaro 1946 kaj la postajn rezoluciojn, kiuj admonas la eliminon de nukleaj armiloj,

maltrankvilaj pro la malrapideco de la nuklea malarmado, pro la graveco kiun prenas la nukleaj armiloj en la konceptoj, doktrinoj kaj militaj politikoj, en la sekureco kaj pro la malŝparado de homaj ekonomiaj rimedoj en la programoj de produktado, de vartado kaj de modernigo de nukleaj armiloj,

sciante ke la jura kaj deviga malpermeso de nukleaj armiloj konstituas gravan kontribuon por iniciati mondon sen nukleaj armiloj, en kiu tiuj armiloj estus eliminotaj de maniero neinvertigebla, kontrolebla kaj travida,

rezolutaj agi por ke realaj progresoj realiĝu por akiri efikan, ĝeneralan kaj tutan malarmadon internacie kontrolatan,

reasertante ke ekzistas devigo daŭrigi traktadojn por alveni efikan nuklean malarmadon internacie kontrolatan,

reasertante ankaŭ ke la apliko de la Traktato pri la ne-multiĝado de nukleaj armiloj estas nepre necesa por faciligi la internaciajn pacon kaj sekurecon,

konsiderante ke la Traktato pri la tuta malpermeso de nukleaj provoj kaj ĝia kontrolo konstituas esencan elementon de nuklea malarmado kaj de ne-multiĝado de nukleaj armiloj,

deklarante sin denove konvinkitaj pri la kreado de internacie agnoskotaj zonoj sen nukleaj armiloj, per libere konkludotaj konsentoj inter la Ŝtatoj de la koncerna regiono, firmigas la regionajn kaj mondajn pacon kaj sekurecon, plifortigas la traktaton de ne-multiĝado de nukleaj armiloj kaj alkontribuas la realigadon de la celo de nuklea malarmado,

substrekte ke neniam dispono de tiu Traktato povas esti interpretota por malpermesi al Ŝtatoj la netransigeblan rajton por disvolvi sen diskriminacio la serĉadon, la produkton

kaj la uzon de la nuklea energio por pacemaj celoj,

konsciaj ke la plena kaj efektiva partopreno de virinoj kaj viroj egalrajtaj estas grava faktoro por daŭraj paco kaj sekureco, kaj decidaj apogi kaj plifortigi la efektivan partoprenon de virinoj en la nuklea malarmado,

konstatante la gravecon de la edukado pri la paco, la malarmado, la riskoj kaj la damaĝoj de la uzo de nukleaj armiloj por la aktualaj kaj venontaj generacioj, kaj decidaj diskonigi tiun Traktaton,

substrekante la rolon de la publika konscienco en la progresoj de la homaro, interalie la alvokon por la tuta elimino de nukleaj armiloj, kaj salutante la penojn de Unuiĝintaj Nacioj, de Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, de la Ruĝa Lunarko, aliaj internaciaj aŭ regionaj organizoj, de neregistaraj organizoj, de religiaj altranguloj, de parlamentanoj, de universitatanoj kaj la hibakushas (*lastaj postvivantoj de Hiroŝimo*),

estas en akordo pri :

Unua Artikolo

Malpermesoj

Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton sin devigas, kiaj ajn estos la cirkonstancoj por :

(a) Neniam studi, provi, produkti, fabriki, akiri, posedi aŭ stoki nukleajn armilojn aŭ nukleajn eksplodajn aparatojn ;

(b) Neniam rekte aŭ nerekte transloki nukleajn armilojn aŭ nukleajn eksplodajn aparatojn, aŭ transdoni la regadon de tiuj armiloj ĉe iu ajn ;

(c) Neniam rekte aŭ nerekte akcepti la translokadon aŭ la regadon de nukleaj armiloj aŭ nukleaj eksplodaj aparatoj ;

(d) Neniam uzi, nek minaci uzi nukleajn armilojn aŭ nukleajn eksplodajn aparatojn ;

(e) Neniam helpi, kuraĝigi aŭ instigi, per ajna maniero, iun ajn, por efektivigi malpermesatan aktivecon al Ŝtato ratifinta la Traktaton ;

(f) Neniam peti aŭ ricevi, per ajna maniero, helpon de iu ajn por efektivigi malpermesatan aktivecon al Ŝtato ratifinta la Traktaton ;

(g) Neniam permesi instalon aŭ deplojadon de nukleaj armiloj aŭ nukleaj eksplodaj aparatoj sur sia teritorio aŭ en loko, kiu dependas de ĝia jurisdikcio aŭ de ĝia administrado.

Dua Artikolo

Deklaroj

1-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton komunikas ĉe la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, plej malfrue 30 tagojn post la valideco de la Traktato por la koncerna Ŝtato, deklaron en kiu ĝi indikas :

a) Ĉu ĝi proprietas aŭ disponis nukleajn armilojn aŭ nukleajn eksplodajn aparatojn. Ĉu ĝi regis tiajn armilojn. Ĉu ĝi rezignis sian programon de nuklea armado. Ĉu ĝi eliminis aŭ neinvertigeble modifis ĉiujn instalaĵojn kiuj servis por la nuklea armado antaŭ ol la Traktato validiĝas por ĝi ;

(b) Ĉu ĝi proprietas aŭ disponas nukleajn armilojn aŭ nukleajn eksplodajn aparatojn aŭ ĉu ĝi regas tiajn armilojn, malgraŭ la 1-a artikolo , alineo (a) ;

(c) Ĉu sur sia teritorio aŭ en loko, kiu dependas de ĝia jurisdikcio aŭ de ĝia administrado, troviĝas nukleaj armiloj aŭ nukleaj eksplodaj aparatoj, kiuj estas la proprieto aŭ sub la dispono aŭ sub la regado de alia Ŝtato, malgraŭ la 1-a artikolo, alineo (g).

2-e. La Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj transendas ĉiujn ricevitaĵojn deklarojn ĉe la Ŝtatoj ratifinta la Traktaton.

Tria Artikolo

Garantioj

1-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton, por kiu la 1-a kaj 2-a paragrafoj de la 4-a artikolo ne aplikiĝas, minimume respektas la devigojn, kiuj estas truditaj al ĝi per la Internacia Oficejo de Atoma Energio kiam la Traktato validiĝas sen difekto por ĉia plia trafa instrumento, kiun ĝi adoptus en la estonteco.

2-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton, por kiu la 1-a kaj 2-a paragrafoj de la 4-a artikolo ne aplikiĝas, konkludas konsenton de ĝeneraligitaj garantioj kun la Internacia Oficejo de Atoma Energio [INFCIRC/153 (korektita)] nur se tiu konsenton ne antaŭe igis kaj la Ŝtato aplikas tiun konsenton. La traktado pri tiu konsento komencas en limtempo de 180 tagoj post la valideco de tiu Traktato por koncerna Ŝtato. La konsento aplikiĝos plej malfrue la 18-an monaton post la valideco de tiu Traktato por koncerna Ŝtato. Poste, ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton aplikos la trudatajn devigojn, sen difekto por ĉia plia trafa instrumento, kiun ĝi adoptus en la estonteco.

Kvara Artikolo

Al la tuta elimino de nukleaj armiloj

1-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton kiu, post la 7-a de julio 2017, proprietas nukleajn armilojn aŭ nukleajn eksplodajn aparatojn, aŭ disponis nukleajn armilojn aŭ nukleajn eksplodajn aparatojn, aŭ regis nukleajn armilojn aŭ nukleajn eksplodajn aparatojn, kaj rezignis sian programon de nuklea armado eliminante aŭ neinvertigeble modifante ĉiujn instalojn kiuj servis por la nuklea armado antaŭ la valideco de la Traktato por la koncerna Ŝtato, kunlaboras kun la internacia kompetenta aŭtoritato nomumata ĉe la 6-a paragrafo de tiu artikolo. Tiu internacia kompetenta aŭtoritato kontrolas la neinvertigeblan rezignon de la programo de la nuklea armado de koncerna Ŝtato. La aŭtoritato raportas al la Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton.

La koncerna Ŝtato ratifinta la Traktaton konkludas kun la Internacia Oficejo de Atoma Energio konsenton, kiu certigas ke ĉiuj deklaritaj nukleaj materioj estos ekskluzive uzotaj por pacemaj nukleaj aktivecoj. La konsento indikas ankaŭ ke neniam ne-deklarita nuklea aktiveco, nek ne-deklarita nuklea materio estos sur la teritorio de la koncerna Ŝtato ratifinta la Traktaton. La traktado pri tiu konsento komencos en limtempo de 180 tagoj post la valideco de tiu Traktato por koncerna Ŝtato. La konsento aplikiĝos plej malfrue la 18-an monaton post la valideco de tiu Traktato por koncerna Ŝtato. Poste, la Ŝtato ratifinta la Traktaton minimume aplikos la trudatajn devigojn, sen difekto por ĉia plia trafa instrumento, kiun ĝi adoptus en la estonteco.

2-e. Malgraŭ la 1-a artikolo, alineo (a), ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton kiu, proprietas nukleajn armilojn aŭ nukleajn eksplodajn aparatojn, aŭ disponas nukleajn armilojn aŭ nukleajn eksplodajn aparatojn, aŭ regas nukleajn armilojn aŭ nukleajn eksplodajn aparatojn, tuj eltiras ilin de la uzo per la armeoj kaj detruas ilin en konvena limtempo. Por la detruo, limdato estas fiksota dum la unua kunveno de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton. Trudota plano, kun precizaj limtempoj, enhavas la kontrolitan kaj neinvertigeblan rezignon de la programo de nuklea armado kaj la eliminon aŭ la neinvertigeblan modifon de ĉiuj instaloj kiuj servas por la nuklea armado. Plej malfrue 60 tagoj post la valideco de la Traktato por la koncerna Ŝtato, tiu ĉi prezentas la planon al la Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton aŭ internacia kompetenta aŭtoritato nomumata de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton. La koncerna Ŝtato traktas la planon kun la internacia kompetenta aŭtoritato, kiu submetas ĝin dum la venonta kunveno de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton aŭ dum la ekzamenkonferenco se tiu konferenco okazus antaŭ la kunveno.

3-e. Ŝtato ratifinta la Traktaton koncerna pro la 2-a paragrafo konkludas, kun la Internacia Oficejo de Atoma Energio, konsenton, kiu certigas ke ĉiuj deklaritaj nukleaj materioj estos ekskluzive uzotaj por pacemaj nukleaj aktivecoj. La konsento indikas ankaŭ ke neniam nuklea ne-deklarita aktiveco, nek neniam nuklea ne-deklarita materio estos sur la teritorio de la koncerna Ŝtato ratifinta la Traktaton. La traktado pri tiu konsento komencos plej malfrue la tagon de la valideco de la plano indikita ĉe la 2-a paragrafo.

La konsento aplikiĝos plej malfrue la 18-an monaton post la dato de la komenco de la traktado. Poste, la Ŝtato ratifinta la Traktaton minimume aplikos la trudatajn devigojn, sen difekto por ĉia plia trafa instrumento, kiun ĝi adoptus en la estonteco. Post la valideco de la konsento indikita en tiu paragrafo, la Ŝtato ratifinta la Traktaton komunikos ĉe la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj deklaron en kiu ĝi informas ke ĝi plenumis siajn devigojn konforme al tiu 4-a artikolo.

4-e. Malgraŭ la 1-a artikolo, alineoj (a) kaj (g), ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton, kiu havas aŭ regas nuklean armilon aŭ alian nuklean eksplodan aparaton de alia Ŝtato sur sia teritorio aŭ en loko, kiu dependas de ĝia jurisdikcio aŭ de ĝia administrado petas de tiu alia Ŝtato, ke ĝi rapide reprenu sian nuklean armadon. La unua kunveno de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton difinas la maksimuman limtempon por la repreno. Post la repreno de nuklea armilo aŭ alia nuklea eksploda aparato, la koncerna Ŝtato ratifinta la Traktaton komunikas ĉe la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj deklaron en kiu ĝi informas ke ĝi plenumis siajn devigojn konforme al tiu 4-a artikolo.

5-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta Traktaton koncerna pro tiu 4-a artikolo prezentas en ĉiu kunveno de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton aŭ dum la ekzamenkonferenco raporton pri la progresado de siaj devigoj ĝis la tuta plenumado de tiuj ĉi.

6-e. La Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton nomumas unu aŭ plurajn internaciajn kompetentajn aŭtoritatojn por traktadi kaj kontroli la neinvertigeblan rezignon de programo pri la nuklea armado. La internacia kompetenta aŭtoritato ankaŭ kontrolas la eliminon aŭ la neinvertigeblan modifon de ĉiuj instalaĵoj kiuj servas por la nuklea armado, konforme al la 1-a, 2-a kaj 3-a paragrafoj de tiu 4-a artikolo. Se la nomumo de la internacia kompetenta aŭtoritato ne okazus antaŭ la valideco de la Traktato por la koncerna Ŝtato ratifinta Traktaton difinita en la 1-a aŭ 2-a de tiu 4-a artikolo, la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj kunvokus eksterordinaran kunvenon de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton por decidi.

Kvina Artikolo

Nacia apliko de la Traktato

1-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton efektivigas la postulatajn aranĝojn por plenumi la devigojn de la Traktato.

2-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton leĝas, reglamentas eĉ antaŭvidas punajn sankciojn por anticipi kaj puni ĉian malpermesatan aktivecon en tiu Traktato, kiu estus entreprenota de personoj aŭ sur teritorio kiuj dependas de ĝia jurisdikcio aŭ de ĝia administrado.

Sesa Artikolo

Asistado al la viktimoj kaj purigado de la medio

1-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton alportas asistadon al la personoj, kiuj troviĝas en ĝia jurisdikcio kaj kiuj estis viktimoj de la uzo aŭ provoj de nukleaj armiloj, konforme al la Humana Internacia Rajto kaj la Homaj Rajtoj. Tiu asistado estas sendiskriminacie adaptata laŭ la aĝo kaj la sekso. Ĝi enhavas la kuracadon, la readaptadon, la psikologian subtenon kaj la revenon en la ekonomia kaj socia vivoj.

2-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton, koncerne la zonojn kiuj dependas de ĝia jurisdikcio aŭ de ĝia administrado kaj kiuj estas poluitaj pro la uzo de nukleaj armiloj aŭ pro provoj de nukleaj armiloj aŭ nukleaj eksplodaj aparatoj, realigas la necesan restaŭradon de tiuj poluitaj zonoj.

3-e. La devigoj en la 1-a kaj 2-a paragrafoj ne ekskluzivas la devigojn, kiujn devas plenumi ĉiu Ŝtato laŭ la internacia juro aŭ duflankaj konsentoj.

Sepa Artikolo

Internaciaj kunlaboro kaj asistado

1-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton kunlaboras kun la aliaj Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton por faciligi la aplikon de tiu Traktato.

2-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton, kiu plenumas la devigojn de tiu Traktato rajtas peti kaj laŭeble ricevi asistadon de aliaj Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton.

3-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton, kiu povas helpi, alportas teknikan, materialan, kaj fincan asistadojn al la Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton, kiuj estis poluitaj pro la uzo de nukleaj armiloj aŭ pro provoj de nukleaj armiloj.

4-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton, kiu povas helpi, alportas asistadon al la viktimoj de la uzo de nukleaj armiloj aŭ de nukleaj provoj aŭ aliaj nukleaj eksplodaj aparatoj.

5-e. La indikita asistado en tiu 7-a artikolo povas esti alportota pere de organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj, de internaciaj, naciaj aŭ regionaj organizoj aŭ institucioj, de neregistaraj organizoj aŭ institucioj, de la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, de la Internacia Federo de Societoj de la Ruĝa Kruco kaj de la Ruĝa Lunarko, de naciaj societoj de la Ruĝa Kruco kaj de la Ruĝa Lunarko aŭ en duflanka kadro.

6-e. Sen ekskluzivi la trudatajn devigojn per la internacia juro, la Ŝtato ratifinta la Traktaton kiu uzis nukleajn armilojn, aŭ efektivigis nukleajn provojn, aŭ uzis aliajn nukleajn eksplodajn aparatojn alportas sufiĉan asistadon al la Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton kiuj estis viktimoj de la nuklea armado.

Oka Artikolo

Kunveno de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton

1-e. La Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton regule kunvenas por ekzameni :

- ĉiujn demandojn, kiuj koncernas la aplikon de la Traktato,
- novajn aranĝojn pri nuklea malarmado por interalie decidi pri

(a) la apliko de la Traktato ;

(b) la kondiĉoj, kiuj ebligas kontroli : en precizajn limtempoj, la neinvertigeblan rezignon de nukleaj programoj, inkluzive la pliajn prokolojn de tiu Traktato ;

(c) ĉiuj aliaj demandoj konforme al la devigoj de tiu Traktato.

2-e. La Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj kunvokos la unuan kunvenon de la

Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton en limtempo de unu jaro post la valideco de tiu Traktato. La postaj kunvenoj estos kunvokotaj de la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj krom se la Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton alie decidus. La kunveno de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton adoptos sian internan regularon dum la unua kunveno de tiuj ĉi. Antaŭ la adopto de tiu interna regularo, la interna Regularo de la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj por la traktado de jura instrumento por malpermesi kaj tute elimini la nukleajn armilojn aplikiĝos.

3-e. Al la skribita peto de Ŝtato ratifinta la Traktaton, la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj kunvokos eksterordinarajn kunvenojn se ĝi opinias necesan tion, kondiĉe ke almenaŭ triono de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton subtenu tiun peton.

4-e. Kvin jarojn post la valideco de tiu Traktato, la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj kunvokos konferencon por ekzameni la funkciadon de la Traktato kaj la plenumitajn progresojn en la realigado de la celoj de la Traktato. Poste, ĉiusesjare, la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj kunvokos ekzamenkonferencojn kun la sama objekto, krom se la Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton decidus alian objekton.

5-e. La Ŝtatoj kiuj ne ratifis la Traktaton, kompetentaj organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj, aliaj kompetentaj internaciaj organizoj aŭ institucioj, regionaj organizoj, la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, la Internacia Federo de Societoj de la Ruĝa Kruco kaj de la Ruĝa Lunarko kaj la koncernaj neregistaraj organizoj estos invitetaj al la kunvenoj de la Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton kaj al la ekzamenkonferencoj estiel observantoj.

Naŭa Artikolo

Kostoj

1-e. La elspezoj de kunvenoj de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton, de ekzamenkonferencoj kaj de eksterordinaraj kunvenoj de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton estos pagotaj de la Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton. La elspezoj de Ŝtatoj kiuj ne ratifis la Traktaton sed kiuj partoprenas en tiuj kunvenoj aŭ konferencoj estiel observantoj estos pagotaj laŭ difinita baremo de Unuiĝintaj Nacioj.

2-e. La elspezoj de la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj por sendi la deklarojn indikitajn en la 2-a artikolo de tiu Traktato, la raportojn indikitajn en la 4-a artikolo kaj la proponojn de amendoj indikitajn en la 10-a artikolo estos pagotaj de la Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton laŭ difinita baremo de Unuiĝintaj Nacioj.

3-e. La elspezoj por la indikitaj kontroloj en la 4-a artikolo, la elspezoj por la detruo de nukleaj armiloj aŭ nukleaj eksplodaj aparatoj, por la rezigno de programoj de nuklea armado, por la elimino aŭ la modifo de ĉiuj instalaĵoj kiuj servis por la nuklea armado devus esti pagotaj de la Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton, kiuj proprietas aŭ disponas aŭ regas nuklean armadon.

Deka Artikolo

Amendoj

1-e. Ŝtato ratifinta la Traktaton povas proponi amendojn al tiu Traktato post la valideco de tiu ĉi. La teksto de la propono de amendo estos komunikota al la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, kiu sendos ĝin al ĉiuj Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton. Ĝi kolektos ilian opinion pri la utileco ekzameni la proponon. Se plimulto de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton anoncus al la Ĝenerala Sekretario, plej malfrue 90 tagojn post la sendo de la propono, ke ili estus favoraj al ekzameno, la propono estus ekzamenota dum la posta kunveno de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton aŭ dum la ekzamenkonferenco se tiu konferenco okazus antaŭ la kunveno.

2-e. La kunvenoj de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton aŭ la ekzamenkonferencoj povas decidi amendojn. La Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, sendas la adoptitan amendon per pozitiva voĉdono de plimulto de du trionoj de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton ĉe ĉiuj Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton.

3-e. La amendo validiĝas por Ŝtato ratifinta la Traktaton 90 tagojn post kiam la plimulto de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton, kiuj partoprenis en la kunveno kie la amendo estis adoptita, estos ratifintaj la amendon. Poste la amendo validiĝas por alia Ŝtato 90 tagojn post la ratifo aŭ la akcepto de la amendo.

Dek unua Artikolo

Finaranĝo de malkonsentoj

1-e. Dum malkonsento, inter du aŭ pluraj Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton, pri la interpreto aŭ la apliko de tiu Traktato, la koncernaj Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton pace diskutos por trovi solvon al la malkonsento, konforme al la 33-a Artikolo de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj.

2-e. La Kunveno de Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton povas interveni por trovi solvon invitante la Ŝtatojn ratifintajn la Traktaton, kiuj havas malkonsenton, komenci traktadoj difinante limdaton por tiuj traktadoj, konforme al la trafaj aranĝoj de tiu Traktato kaj laŭ la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj.

Dek dua Artikolo

Universaleco

Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton kuraĝigas ĉiujn Ŝtatojn, kiuj ne ratifis la Traktaton, por ke ili ratifu, akceptu, aprobu aŭ aliĝu al tiu Traktato kaj ke ĝi jene iĝu universala.

Dek tria Artikolo

Subskribo

La subskribo de tiu Traktato komencos, por ĉiuj Ŝtatoj, la 20-an de septembro 2017 ĉe la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko.

Dek kvara Artikolo

Ratifo, akcepto, aprobo aŭ aliĝo

La Traktato estas submetata al la ratifo, la akcepto aŭ la aprobo de subskribintaj Ŝtatoj. Ĝi estas malfermata al la aliĝo.

Dek kvina Artikolo

Valideco

1-e. La Traktato validiĝas 90 tagojn post la 50-a enskribo de la instrumento de ratifo, akcepto, aprobo aŭ aliĝo.

2-e. Por la Ŝtato, kiu metas sian instrumenton de ratifo, de akcepto, de aprobo aŭ aliĝo post la dato de la enskribo de la kvindeka instrumento de ratifo, de akcepto, de aprobo aŭ aliĝo, la Traktato validiĝas 90 tagojn post la dato de la enskribo de la instrumento de ratifo, de akcepto, de aprobo aŭ aliĝo de tiu Ŝtato.

Dek sesa Artikolo

Rezervoj

Nenia rezervo povas esti formulata pri la artikoloj de tiu Traktato.

Dek sepa Artikolo

Daŭro kaj retiriĝo

1-e. La daŭro de la Traktato estas senlima.

2-e. Ĉiu Ŝtato ratifinta la Traktaton, kadre de sia nacia suvereneco, rajtas retiriĝi de la Traktato se ĝi decidas ke eksterordinaraj eventoj, rilate la objekton de la Traktato, kompromitis la plejsuprajn interesojn de ĝia lando. Ĝi devas tiam anonci sian retiriĝon ĉe la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj. La anonco enhavu raporton pri la eksterordinaraj eventoj, kiuj kompromitis la plejsuprajn interesojn de la koncerna Ŝtato.

3-e. La retiriĝo komencas nur 12 monatojn post la ricevo de la anonco de la retiriĝo ĉe la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj. Tamen, je la fino de la periodo de 12 monatoj, se la Ŝtato ratifinta la Traktaton militus, la devigoj de tiu Traktato kaj de pliaj protokoloj trudiĝus al ĝi ĝis la fino de la milito.

Dek oka Artikolo

Rilatoj kun aliaj konsentoj

La valideco de la Traktato ne ekskluzivas la aprobitajn devigojn de la Ŝtatoj ratifintaj la Traktaton pri internaciaj konsentoj kondiĉe, ke la devigoj estu interkonvenaj kun la Traktato.

Dek naŭa Artikolo

Deponprenanto

La Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj estas la Deponprenanto de tiu Traktato.

Dudeka Artikolo

Aŭtentikeco

La angla, araba, ĉina, hispana, franca kaj rusa tekstoj de la Traktato estas aŭtentikaj.

Redaktita ĉe Novjorko la sepan de julio dumil dek sep.